NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)
Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492
☎ portebla: 34-658.709.087
esperantobi@gmail.com
TTT-ejo: http://www.geocities.com/esperantobilbao

Jar-kotizoj: Normala: 20 ∈. Speciala: 15 ∈. Familia: 35 ∈.
BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

JANUARO/FEBRUARO 2009 **Nro. 77 (1/09)**



Ludwig Lazar Zamenhof (Bjalistoko, 15/12/1859 – Varsovio, 14/04/1917)

Ĉi-jare, la monda esperantistaro omaĝos la iniciatinton de Esperanto pro la 150-a datreveno de lia naskiĝo. Ankaŭ nia Grupo aliĝos al tiu jubileo.

LOKE ...

LA "VERDULOJ" KONTAKTIS NIN.

La 26-an de januaro, la unua homo en la listo de la vaska sekcio de la partio "Berdeak-Los Verdes" ("*La Verduloj*") en la provinco Gipuzko, Alberto Lejardi, sendis retleteron al E-Grupo de Bilbao. Al li oni farigis responsulon pri laborgrupo "pri Esperanto" en la tuta Hispanio. Ni ne forgesu ke la 1-an de marto okazis balotado por elekti la vaskan parlamenton.

Post telefona interparolado, ni informis pri la lingvo kaj niaj celoj; samtempe, pri la apero de E-partio en Francio. Ankaŭ ni substrekis nian politikan neŭtralecon kiel E-asocio, sed ke tio ne malhelpas estontan kunlaboron.

Malgraŭ lia plena nescio pri la temo, li aspektis tre interesita por profundigi siajn konojn pri la internacia lingvo kaj promesis estontajn kontakton kaj kunlaboron.

PETO DE SUBVENCIOJ.

Laŭlonge de la jaro 2009, la monda E-movado festos la 150-an naskiĝdatrevenon de la kreinto de Esperanto, Ludwig Lazar Zamenhof (Białystok, 15/12/1859 – Varsovio, 14/04/1917).

Okaze de tio, kunlabore kun Hispana E-Federacio, nia Grupo petis subvenciojn al Bizkaja Deputacio kaj al Bilbaoa Magistrato cele al disvolvigo de omaĝa programo, kies tri punktoj estas:

- Ekspozicio pri Zamenhof: la homo, lia verko kaj lia penso.
- Disdonado de libroj al diversaj institucioj.
- Eldono de libro pri la historio de Esperanto en Bilbao kaj Bizkajo.

La kosto de la projekto sumas ĉirkaŭ 7.000 eŭrojn.

KOMPUTILIGO DE NIA "LIBROSERVO".

Ni komencis laboron ĝis nun ne farita, nome, enkomputiligon de la diversaj varoj, kiuj kuŝas sur bretoj por esti vendataj al interesiĝantoj. Tiamaniere, ni scios precize la monon investitan en tiuj esperantaĵoj kaj liberigos nin el neinteresaj taskoj, tiel kiel serĉado de konkreta libro aŭ aktualigo de la vendo-prezoj.

NE FORGESU (KAJ UZU !) LA RET-ADRESON DE NIA E-GRUPO :

esperantobi@gmail.com

Ni regule rigardas ĝian enhavon. Tamen, se ni ne tuj respondus, ne maltrankviliĝu : ni ne estas profesiuloj, kiuj daŭre deĵoras antaŭ komputilo. Sed certe ni respondos kiel eble plej baldaŭ.

VENONTAJ KONGRESOJ.

- 6-a ĝis 9-a de Marto. **Iberia Renkontiĝo 2009** ("Duria Plonĝado") Oporto.http://esperanto.pt/ir2009 kaj en www.esperanto.es

- 28-a de majo ĝis 3-a de junio. **68-a Eŭropa Esperanto-Kongreso**. Herzberg am Harz (Germanio).

- 2-a ĝis 5-a de julio. **68a Hispana Kongreso** de Esperanto kaj 14a Andaluzia Kongreso de Esperanto. Malago. www.esperanto.es

- 10a ĝis 18a de julio, samtempe kun Somera Esperanto Studado (SES), en Slovakujo okazos jam la **dua renkontiĝo de lernu!-uzantoj**, kreantoj kaj helpantoj. Kiel kutime, matene okazos diversnivelaj Esperanto-kursoj, posttagmeze - uzinoj, konkursoj, prelegoj kaj vespere - distra programo. Eblos ankaŭ pasi internaciajn ekzamenojn de Esperanto. Post la aranĝo ĉiuj estas invitataj kune veturi al Internacia Junulara Kongreso, kiu okazos en Ĉeĥujo tuj post SES.
  http://lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/index.php

- 18-25 julio **65-a Internacia Junulara Kongreso, IJK** en Liberec, Ĉehio, kun la temo "Libereco". Por aliĝilo, programo kaj aktulalaj novaĵoj vizitu la retpaĝon: ijk.esperanto.cz. Kontaktoj per retpoŝto: ijk@esperanto.cz

- 18-25 julio **82-a Kongreso de SAT** - en Milano, Italio. Titolo de la Kongreso estas: "Elmigri senlandlime, vivi sennaciece". Inf.: Andrea Montagner, andrea.montagner@arciesperanto.it

- 25-a julio ĝis 1-a aŭgusto. **94-a Universala Kongreso** de Esperanto. Bialystok (Pollando). http://94uk.bialystok.pl

- 5 - 11. oktobro **17-a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo** en bela mediteranea urbo de Costa Brava (Klifa Marbordo) en Hispanio. Inf.: luis_serrano@mixmail.com

VENU AL "ESPERANTO-CAFE" EN BJALISTOKO!

Vizitu rete kaj persone (dum kongreso) kafejon Esperanto-Cafe en Bjalistoko. Gustumu specialan kukon "Esperantka" kun verda stelo! Ĉion vi povas mendi Esperante!!! http://www.esperanto-cafe.pl/home.eo (laŭ polaj-esperantistoj)

(Retpoŝte, Miguel Gutiérrez Adúriz. 21-12-2008)

H.E.F.

DEĴORADO ĈE LA HEF-Oficejo.

Sabate, de 11,00 ĝis 13,00, deĵoras Miguel, estrarano pri HEJS.

HEF-NOVAĴOJ.

- Dum januaro HEF devas sendi al "Agencia Tributaria" datumoj de la membroj kiuj pagis la kotizon 2008. Ili ricevos dekalkulon en "IRPF".

- Dank'al la helpo de Tono del Barrio, la estraro de HEF denove petis subvencion al Ministerio pri Kulturo; tiu-ĉi jare, okaze de la 150-a naskiĝdatreveno de Zamenhof.

("Nia Voĉo". Organo de Madrida E-Liceo. Januaro 2009)

INAŬGURO DE ESPERANTO-MONUMENTO EN ZARAGOZO.

Okaze de la 100-jariĝo de la aragona E-Asocio "Frateco", la esperantistoj decidis starigi monumenton dediĉitan al Esperanto en la placo "Glorieta del Esperanto".

La projekto estis financata per volontulaj kontribuoj de lokaj esperantistoj. Temas pri reprezento de la terglobo kun ŝildo pri Esperanto.

La inaŭguro okazis la sabaton, 13an de decembro je la 12:00 h.

(Lorenzo Noguero, Prezidanto de "Frateco")

Evento en Madrido: forumo "Esperanto kaj Zamenhof, defio al Babelo".

La forumo **"Esperanto kaj Zamenhof, defio al Babelo"** okazos **sabate 25 kaj dimanĉe 26 Aprilo 2009** en Madrido.

Ĝin organizas Madrida Esperanto-Liceo kunlabore kun Hispana Esperanto-Federacio: ĝi okazos en **Centro Dotacional Integrado, strato Canarias, 17, Madrido.** En la programo, aldone al prelegoj, kolokvoj kaj debatoj anoncotaj, okazos du korusaj prezentoj: sabate 25 Aprilo je 19.00, **koncerto de Koruso "Verda Stelo"**, kiu celebras sian 25an datrevenon, kaj dimanĉe 26 Aprilo je 12.00, **koncerto de Koruso "Esperanto".**

(El la retpaĝaro de HEF)

La 68a **Hispana Kongreso de Esperanto** okazos en Malago, de la 2a ĝis 5a julio, 2009 (de ĵaŭdo ĝis dimanĉo).

Ĝis nun aliĝis 24 homoj (23/02/2009).

TRA LA MONDO ...

EL ESPECULADOR FILÁNTROPO.

30-11-2008 02:44:28



El personaje que según la revista Forbes ocupa el puesto número 97 entre los hombres más ricos del mundo, con una fortuna calculada en 9.000 millones de dólares, nació el 12 de agosto de 1930 bajo el nombre de György Schwartz, en Budapest. Su padre, un **traductor y profesor de esperanto**, decidió cambiar el apellido familiar por el de **Soros (palabra que significa «se elevará» en esperanto)** ante el creciente antisemitismo que se vivía entonces en Hungría. **George Soros es una de esas mil personas en el mundo que hablan el esperanto desde la cuna**.

Tras la guerra escapó de la ocupación soviética refugiándose en Inglaterra, donde se graduó en la célebre London School of Economics. En 1952 emigró a Estados Unidos, país del que adoptó su nacionalidad. Es uno de los hombres que más dinero ha ganado en la Bolsa en el siglo XX. Se hizo famoso al causar con sus especulaciones el derrumbe de la libra británica en 1992. Ya en los años 70 empezó a apoyar con su dinero a los disidentes en los países ex comunistas y a estudiantes negros en el régimen de apartheid en Suráfrica. Después de la caída del comunismo, Soros fundó el Instituto «Open Society» (Sociedad Abierta), que se dedica a apoyar la transición democrática en Europa del Este, Asia Central y el Cáucaso. La revista estadounidense TIME calcula que hasta el año 2007, Soros invirtió unos 6.000 millones de dólares en proyectos de filantropía.

(Aperinta en "ABC.es". 30/11/2008. Trovis ĝin Jaime Vinielles kaj sendis Manolo Parra (Madrido))

LA UNUA FILMO TUTE EN ESPERANTO.

Mi nun vidis tion-ĉi:
http://meneame.net/story/angoroj-primera-pelicula-rodada-integramente-esperanto

(Tonjo del Barrio. Madrido. 01/01/2009)

Pri tiu-ĉi novaĵo, se oni eniras Vikipedion, eblas legi:

Angoroj (1964; "*Angustias*" en idioma esperanto) fue la primera película rodada completamente en esperanto. El director, Jacques-Louis Mahé, amigo del escritor esperantista Raymond Schwartz, ya había producido una película muda propagandística antes de la Segunda Guerra Mundial, de nombre *Antaŭen!* (*¡Adelante!*).

A comienzos de la década de 1960, Mahé, experto en fotografía y cine, invirtió en la producción de la que fue la primera película en esperanto. En el escenario que el propio Mahé creó los actores del *Internacia Arta Teatro* interpretan una novela policíaca que tiene lugar en un suburbio parisino donde se desenvuelven ladrones y estafadores. A parte de

Raymond Schwartz (en el papel de comisario), aparecen Gaston Waringhien (narrador) y muchos otros del París de la época, incluso un jovencísimo Michel Duc-Goninaz.

La película, rodada entre 1963 y 1964, no obtuvo una buena respuesta del público. Mahé perdió grandes cantidades de dinero y acusó a la Asociación Universal de Esperanto de boicot. Inmerso en una profunda depresión destruyó casi todas las copias; sólo se salvaron dos (adquiridas en su día por el centro cultural esperantista Château de Grésillon y la Asociación Británica de Esperanto) y la cinta original, que recuperó la productora LF-koop en 1991 y de la que editó un vídeo de 61 minutos.

(Ĉerpita de "http://es.wikipedia.org/wiki/Angoroj")

SOLENAĴO ĈE UNESCO.

La 15an de decembro en Parizo okazis UNESCO-ceremonio omaĝe al komenco de la 150-a jaro ekde la naskiĝo de L. L. Zamenhof.

La ceremnion organizis UEA kune kun la pola kaj litova delegacioj ĉe UNESCO. La ceremonion prezidis prof. Barbara Despiney. Enkondukan prelegon faris reprezentanto de Ĝenerala Direktoro, respondeculo pri la Jaro de la Lingvoj ĉe UNESCO Mauro Rosi. Salutmesaĝojn de la prezidanto de UEA Probal Dasgupta kaj de la vicprezidanto de AIS Carlo Minnaja legis la vicprezidanto de UEA Claude Normount. Festparoladon faris Christopher Louis Zaleski-Zamenhof. Prelegis fama franca lingvistino Hanriete Walter. Nome de UEA parolis juna esperantistino Estelle Loiseau, kiu prezentis UK-ojn kaj IJK-ojn, bedaŭrinde sen mencii plian diversecon de E-movado.

Nome de ILEI la ceremonion partoprenis Francois Lo Jacomo, Jean-Pierre Boulet, reprezentantoj de ILEI ĉe UNESCO kaj Aida Cizikaite, estrarano de ILEI. Francois Lo Jacomo diris kelkajn vortojn, menciis, ke li reprezentas ILEI kaj montris per komputilo parton de filmeto "Esperanto estas" de E@I (en Esperanto kun franclingvaj surskriboj).

Fine de la ceremonio sekvis diskuto. Entute la ceremonion partoprenis ĉirkau 400 personoj, plejparte el Francio, sed ankaŭ el kelkaj aliaj pli aŭ malpli proksimaj landoj. Preskaŭ ĉiuj paroloj okazis en la franca kun samtempa traduko al Esperanto. Nur salutmesaĝoj estis lautlegitaj en Esperanto kaj tradukitaj al la franca. Unura esperantlingva interveno dum la diskuto restis sen traduko.

Laŭ invito de Monique Arnaud kaj Jean-Pierre Boulet al la ceremonio venis eldonisto (li ja estas princo de unu el triboj) Hubert Guezo el Benino, la sama kiu partoprenis inaŭguron de nia konferenco en Portonovo. Li jam havas kontaktojn kun esperantistoj, planas kunlaborojn kaj tre interesiĝas pri projekto, kunordigata de Vlad'ka Chvatalova. Mi kaptis la okazon kaj prezentis konferencon en Portonovo ĉe UFE kaj festa kunveno de SAT Amikaro, menciante ankaŭ de Vladka Chvatalova kunordigatan projekton, kiu naskiĝis lige al ŝia partopreno en ILEI konferenco en Benino kaj estas unu el postsekvoj de konkreta kunlaboro inter eŭropaj kaj afrikaj esperantistoj.

Festa parolo de C. L Zaleski-Zamenhof videblas en
http://www.dailymotion.com/video/x7r45x_louis-zaleski-zamenhof-lunesco_news
Prelego de lingvistino H. Walter videblas en
http://www.ipernity.com/doc/fsoghomonian/3655103/

(Aida Cizikaite. Eŭropa Bulteno. Dec. 2008)

MESAĜO DE LA PAPO URBI et ORBI KRISTNASKON 2008.

Samkiel dum la antaŭaj benoj Urbi et Orbi, Kristnaske kaj Paske, ankaŭ ĉi-foje grupo de esperantistoj ĉeestis en placo sankta Petro por levi alte la panelojn kiuj konsistigis la vorton "Esperanto". Plurfoje la rekta elsendo montris ilin. Neoficiala traduko en Esperanto troviĝas ĉe: http://www.ikue.org/kristnasko2008

(Eŭropa Bulteno. Dec. 2008)

DOS DIPUTADOS PIDEN QUE SE INTRODUZCA EL ESPERANTO EN LA UE.

Mi jxus legis cxi tion:

"Mientras socialistas y nacionalistas se enfrentaban con populares por los contenidos del informe y su posible repercusión, dos diputados ajenos a los roces políticos que genera la inmersión lingüística en Cataluña aprovecharon para pedir que se introduzca el esperanto como lengua de uso en la Unión Europea. La diputada eslovaca, Ljudmila Novak (Grupo del Partido Popular Europeo) señaló que la reintroducción de esta lengua «podría facilitar la comprensión en Europa y con los pueblos de otros continentes, puesto que es una lengua fácil de aprender y utilizar». El italiano Marco Cappato (Grupo de la Alianza de los Demócratas y Liberales por Europa) defendió también la introducción del idioma apoyado por la UNESCO y pidió que se adopte «en los sistemas educativos por su estatuto de neutralidad y porque es fácil de aprender»."

Ĉe:http://www.abc.es/20090219/catalunya-catalunya/diputados-ajenos-pelea-piden-20090219.html

(Félix Gómez. Per ret-poŝto. 19/02/2009)

NOVA E-POŜTMARKO.

AŬSTRIO: La 1-an de decembro 2008 aperis la aŭstria poŝtmarko "esperanto.net" okaze de la jubileo "100 jaroj de Universala Esperanto-Asocio". Unu ekzemplero estas senkoste havebla ĉe: esperanto@chello.at

(Walter Klag. 27/12/2008)

LA NOVTIPA UEA-EKZAMENO SUKCESE PREMIERIS.

Post kelkjara laboro, je la jarŝanĝo debutis la nova Esperanto-ekzameno, kiu estas konforma al la normoj de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) kaj ofertas egalrangan mezuradon de la kvar bazaj lingvaj kapabloj en la niveloj B1, B2 kaj C1. Partoprenantoj de la Internacia Festivalo (IF) en Düsseldorf havis la bonŝancon esti la unuaj por trapasi tiun internacie rekonatan ekzamenon. Sume 8 personoj el 6 landoj uzis la eblecon: 3 el ili elektis la nivelon B2 (forta meznivelo postulanta fluan parolkapablon,

bonstilan memstaran verkadon, komprenkapablon de tekstoj el la cxiutaga vivo) kaj 5 kandidatoj aligxis al la pli supera nivelo C1.

Laŭ la regularo kontraktita kun la Ŝtata Lingvoekzamena Centro (ITK) en Budapeŝto, Hungario, la skribaj taskoj (farendaj en 180 minutoj en B2 kaj en 240 minutoj en C1) estos korektataj tie fare de spertaj fakuloj, kiuj prizorgas la akredititajn samnivelajn ekzamenojn aprobitajn ankaŭ de la Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo (ALTE). La surlokajn buŝajn ekzamenojn en Düsseldorf gvidis Renato Corsetti kaj Zsófia Kóródy, ambaŭ trejnitaj ekzamenantoj laŭ la KER-postuloj. UEA kore gratulas al la unuaj ekzamenitoj, kiuj bonege sukcesis en la buŝa parto. Estas ĝojige, ke tiom multaj ekzamenigantoj anoncis sin malgraŭ la jarfina festo kaj la mallonga tempo, kiu restis post la fina decido okazigi la ekzamenojn ankoraŭ en 2008.

Ekde nun eblos regule organizi tiujn normigitajn UEA-ekzamenojn en grandaj internaciaj renkontiĝoj aŭ aliloke, kie estos grupo de kandidatoj por almenaux unu el la tri niveloj. Por 2009 estas jam planataj ekzamensesioj dum la Printempa Semajno Internacia (PSI) en St. Andreasberg, Germanio, inter 10-17 aprilo; dum la Malferma Tago en la Centra Oficejo de UEA (Roterdamo, Nederlando) en majo; kaj dum la 94-a UK en Bjalistoko (Pollando) en julio.

Pli detalaj informoj pri la ekzamenoj trovigxas en: http://www.edukado.net/pagina/NOVAJ+UEA-EKZAMENOJ/22422/

(Osmo Buller, Ĝenerala Sekretario de UEA. 08/01/2009)

PARLAMENTANINO LJUDMILA NOVAK PROPONIS AL EŬROPA PARLAMENTO ESPERANTON.

Membrino de Eŭropa Parlamento Ljudmila Novak prezentis la 21-an de januaro 2009 al la Eŭropa Parlamento en Komitato por Kulturo sub la signo: PE 416.668v01-00 kadre de debato pri la raporto/opinio pri multlingveco de Vasco Graca Moura tri proponojn pri ŝanĝoj de artikolo 4:

Propono pri ŝanĝo:

4a. (nova) konstatas ke la principo de estimo de egalrajteco ne povas esti certigita dum oni uzas nacian lingvon (la anglan) kiel »lingua franca«.

Propono pri ŝanĝo:

4b. (nova) proponas, ke konservante kaj uzante vivajn lingvojn, estimante lingvan diversecon kaj stimulante lernadon de diversaj lingvoj oni pristudu la eblecon kaj utilecon de enkonduko de komuna artefarita lingvo en EU, ekzemple Esperanto. Nur ĝi povus faciligi interkompreniĝadon en Eŭropo kaj kun loĝantoj de aliaj kontinentoj, ĉar ĝi estas simpla por lernado kaj uzo.

Propono de ŝanĝo:

4.c. (nova) konstatas, ke la enkonduko de eŭro kiel komuna eŭropa monunuo, ege faciligis komercadon inter la ŝtatoj kaj helpis al ekonomia kresko kaj pli granda stabileco en EU. Similajn efektojn povus havi ankaŭ enkonduko de komuna komuniklingvo, kiu ja neniel forigus aŭ limigus uzon de naciaj kaj aliaj vivaj lingvoj uzataj en EU.

(Zlatko Tišljar. 28/01/2009)